

# Titano

Titano estas la ĉefa luno de la planedo Saturno, kiu havas pli ol 60 lunojn. Titano estas entute unu el la plej grandaj lunoj en la sunsistemo, pli granda, ekzemple, ol la planedo Merkuro. Titano estas la due plej granda luno en la sunsistemo, post la Jupitera Ganimedo.

La 25an de marto de la jaro 1655, Titanon malkovris la nederlanda astronomo Christiaan Huygens. Ĝi estis la unua satelito malkovrita en nia sunsistemo post la galileaj lunoj de Jupitero. Ĝi nuntempe ankaŭ estas la sola konata luno, kiu havas plenan atmosferon.

Titano nomiĝis el la grekmitologia raso de dioj, regis dum la Ora Epoko.

Dum januaro de la jaro 2007, sciencistoj anoncis, ke estas klaraj indikoj por lagoj de likva metano sur la surfaco de Titano. Estas neniu alia mondo, krom la Tero, kie oni jam malkovris stabilajn korpojn de likvo. Kelkaj lagoj estas komplete nigraj, reflektante neniujn radarsignalojn.

La atmosfero, el ĉirkaŭe 98,4 % da nitrogeno kaj 1,6 % da metano, enhavas organikaĵn kombinaĵojn kaj, laŭ la astrosciencistoj, similas la primitivan kemian kondiĉon de la Tero.

Sed alie ol la Tero, la surfaca temperaturo estas multe pli malalta ĉe  $-179^{\circ}\text{C}$ . Atmosfera premo ĉe la surfaco estas 146,7 kPa, kiu estas pli ol ĉe la Tero.

La 14an de januaro de la jaro 2005, la sondilo “Huygens” de la Eŭropa Spaca Agentejo, ESA, atingis la grundon de Titano, post 7 jarojn longa vojaĝo sur la kosmoŝipo “Cassini” de la NASA, Usona Spaca Agentejo. La misio “Cassini-Huygens” startis en la jaro 1997. Dum Cassini orbitis ĉirkaŭ Titano kaj analizis la saturnan lunon el spaco, la robota laboratorio Huygens studis la konsiston de la atmosfero de Titano, registris fizikajn datenojn kaj sonojn, kaj fotis la titanan surfacon. Huygens estas la unua homara kosmoveturilo, kiu atingis la surfacon de luno aŭ planedo en la ekstera parto de la sunsistemo, transe de Marso.

Titano ne estas vulkane aktiva. Sur la surfaco troviĝas multaj dunoj en kelkaj dezertoj sub densaj nuboj.

Relative fama regiono de la titana surfaco estas “Xanadu”, multe lumreflektanta areo ĉe la antaŭa hemisfero. Ĝi nomiĝas pro la legenda somera palaco en la poemo *Kubla Khan* de la angla verkisto Samuel Taylor Coleridge.

La unuaj bildoj ŝajne montris mallongajn, stumpajn drenadajn kanalojn direktiĝantajn al “marbordo”, kaj glaciajn blokojn disŝutitajn ĉirkaŭ la alteriĝo-punkto.

La astrosciencistoj esperas, ke la misio de Huygens povos plibonigi niajn sciojn pri la primitiva Tero, kie la vivo ekis.

Retpaĝo: [www.traduki.de](http://www.traduki.de)

Teksto: [eo.wikipedia.org/wiki/Titano\\_\(luno\)](http://eo.wikipedia.org/wiki/Titano_(luno))